

En januaro 1866 Ĉajkovskij transloĝiĝis en Moskvon laŭ la invito de Nikolaj Rubinŝtejn – la frato de Anton Rubinŝtejn – kaj komencis instrui en muzikaj klasoj de Rusia muzika societo, kaj ekde aŭtuno de la sama jaro li iĝis profesoro de ĵus malfermita Moskva konservatorio, kies direktoro iĝis Nikolaj Rubinŝtejn.

En 1868 okazis la premiero de la Unua simfonio, kiun Ĉajkovskij nomis "Vintraj sonĝoj". Direktis Nikolaj Rubinŝtejn, al kiu estis dediĉita la simfonio. La premiero pasis sukcese.




Kelkajn tagojn antaŭ la nova jaro 1877 Pjotr Iljiĉ ricevas la leteron: "Diri al vi, al kiu admiro kondukas min viaj komponaĵoj, mi opinias nekonvena... Tial mi nur diros kaj petas vin kredi tion, ke kun via muziko oni vivas pli facile kaj pli agrable". La korespondantino estis admirantino de lia kreado Nadejda Filaretovna fon Mekk, vidvino de milionulo. Tiu ĉi letero estis komenco de multjara korespondado kaj

mirinda amikeco inter du homoj, kiuj neniam sukcesis vidi unu la alian. La kvaran simfonion la aŭtoro dediĉis al Nadejda fon Mekk.

Ĉajkovskij estis granda majstro en ĉiuj ĝenroj, en kiuj li kreis komponaĵojn. Li estis rusa komponisto de la romantika epoko. Li estas konata pro siaj baletoj, operoj, simfonioj.



Multaj urboj en nia lando havas monumentojn, dediĉitajn al la granda komponisto. Ankaŭ en Votkinsk en la jaro 1990 estas inaŭgurita Ĉajkovskij-monumento (skulptisto O.Komov, arkitekto N.Komova).




La monumentoj en la urboj Ĉajkovskij kaj Klin.

Aŭtoroj: Bronislav Ĉupin (Iĵevsk),
Margarita Karceva (Uljanovsk)



P.I.ĈAJKOVSKI



La granda rusa komponisto Pjotr Iljiĉ Ĉajkovskij naskiĝis la 25-an de aprilo 1840 en la malgranda apuduzina urbeto Votkinsk, Udmurta Respubliko, Rusio.

En tiu epoko Votkinsk estis muzika urbeto. Ilja Petroviĉ Ĉajkovskij skribis iufoje al la edzino: “Ĉi tie en ĉiu angulo estas rondodancoj kaj balanciloj”.



La gepatroj de estonta komponisto estis mirinde harmonia kaj feliĉa geedza paro. En ilia hejmo ĉiam regis la etoso de amo kaj reciproka estimo. La patro Ilja Petroviĉ laboris kiel estro de feroproduktanta uzino. Li havis profundajn teoriajn kaj praktikajn sciojn kaj neordinarajn aferajn kvalitojn. La patrino Aleksandra Andrejevna, finstudinte peterburĝan orfan instituton, ricevis bonan kleron. Ŝi posedis du fremdajn lingvojn, bone komprenis muzikon, nemalbone ludis pianon kaj agrable kantis.



De la patro estonta komponisto heredis admiran rilaton al arto, muziko kaj naturo. Ankaŭ de la patro li akiris neordinaran optimismon, mirindan laboremon, honestecon kaj plenan foreston de profitemo.

La tria persono, al kiu li spertis senton de sincera amikeco kaj infana amo, iĝis lia guvernistino, francino Fanni Djurbaĥ.




Rememoroj pri la infaneco, pri la domo en Votkinsk akompanis la komponiston dum la tuta vivo. Ili iĝis bazo por muziko de “Porinfana albumo”, “Dek ses kantoj por infanoj”, baletoj “Ŝĉelkunĉik” (La Nuksrompilo).

Aŭtune 1850 10-jaran Peĉjon oni veturigis en Peterburĝon, kie li estis akceptita enfaklernejo pri juroscienco. Dum libera tempo plej ofte oni vidis lin en muzika ĉambro, kie li improvizis.

Grandan rolon ludis la instruisto pri muziko, pianisto kaj pedagogo Rudolf Kjudinger. Nelonge lernis ĉe Kjudinger la estonta komponisto, sed influo de tiuj lecionoj estis granda. La okupoj kun Kjudinger aldonis al Ĉajkovskij certecon pri propraj fortoj. Unuafoje en sia vivo li aŭdacis surpaperigi sian unuan komponaĵon. Tio estis romanco je versoj de Afanasij Fet “Mia genio”.

En majo 1859 Pjotr Iljiĉ finstudis en la faklernejo, ricevinte rangon de titulara konsilanto. Ĉirkaŭ kvar jarojn li laboris en departemento de jura ministerio. Ne ricevante kontentigon en cara servo, li senpacience atendis finon de “ĉeesta” tempo.

21-jara Ĉajkovskij komencis lerni en Muzikaj klasoj, fonditaj antaŭ unu jaro laŭ la iniciato de Anton Rubinŝtejn. La pedagogoj estis bonegaj.



En septembro 1862 en Peterburĝo estis malfermita la unua ruslanda konservatorio, kies direktoro iĝis Anton Rubinŝtejn. Ĉajkovskij tuj studentiĝis kaj finstudis ĝin kun la plej alta distingo – arĝenta medalo.